

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Vojaĝo al Ihatovo

Doi Hirokaz



De la 26a ĝis la 28a de majo naŭ membroj de nia klubo (Ne-profitcela Organizo Esperanto Jokohama) vojaĝis al la gubernio Iwate [iŭate] en Nord-Orienta Regiono en Japanio, kaj vizitis la ekspozicion pri “la verkisto Miyazawa Kenji [mijazaŭa kenĵi] kaj Esperanto”, kiu okazis en la muzeo “Ihatova Halo de Miyazawa Kenji” en la urbo Hanamaki; Ihatovo estas karesa nomo de la gubernio Iŭate, nomita de la verkisto.

La ekspozicio tre detale prezentis la verkiston kaj ankaŭ Esperanton. Pri la klarigoj sin dediĉis kvar fakuloj, inter kiuj estas esperantisto Satoo Rjuuĉi. Laŭ mia supozo lia klopodo realigis la ekspozicion, ĉar li estas punta persono pri la aferoj inter la verkisto kaj Esperanto.

La klarigoj konsistis el 11 temoj sur 21 paneloj:

1. Kronologio pri Miyazawa Kenji kaj Esperanto
2. Naskiĝo de Esperanto kaj ĝia disvastiĝo en Japanio
3. Takusari Kooki (la kreinto de la japana stenografio) kaj Miyazawa Kenji

4. Japana folkloristo-esperantisto Sasaki Kizen, rakonto “Ĉambra Infano 1”

5. Japana folkloristo-esperantisto Yanagita Kunio, rakonto “Ĉambra Infano 2”

6. “Partopreno en Vegetarana Kongreso de Ekstrem-Oriento, 1931-a” kaj la verko “Placo de Polano”

7. Miyazawa Kenji kaj Ramstedt

8. Japana Fervojo, la linio Kamaiŝi kaj Esperantaj karesnomoj de la stacidomoj

9. Tradukitaj verkoj de Miyazawa Kenji en Esperanton

10. Nuna stato de Esperanto ĉefe en Japanio

11. Esperano-uzantoj disvastiĝas en 120 landoj
Malsupre de la paneloj oni prezentas librojn pruntitajn ĉefe de JEI.

Kvankam mortis la verkisto Miyazawa juna en la 37-jaraĝa, liaj verkoj estis daŭre legataj nun, kaj multaj studentoj studadas pri li. Estas Konstruitaj Muzeoj pri li, kaj troviĝas eĉ Parkego temanta pri li, pri liaj verkoj kaj pri objektoj aperintaj en la verkoj. Por la lasta troviĝas apartaj dometoj. La parko estas nomita “Vilaĝo de fabeloj de Miyazawa Kenji”.

Multe da japanaj esperantistoj ŝatas la etoson kaj la mondon de liaj fabeloj, kaj multaj el liaj verkoj estas tradukitaj en Esperanton.

La membroj de ĉi tiu vojaĝo vizitis ankaŭ aliajn muzeojn rilatajn al la verkisto.

Gigantoj

SUZUKI Keiichiro

En la muzeoj en Hanamaki mi eksciis la detalajn faraĵojn de du gigantoj, MIYAZAWA Kenji kaj NITOBÉ Inazo. Talentoj de Kenji en vastaj kampoj estas senlime admirindaj. Vidante la violonĉelon kiun li ludis, mi sentis lin proksime. La historio de la prapatroj de Inazo interesis min. Lia vera internacieco estis

tre impresa. Kiel esperantisto, mi ĝojas, ke la gigantoj ambaŭ restigis spurojn sur la historio de Esperanto.

Floroj

Antaŭ la stacidomo de Ŝin-Hanamaki alpa rozo (*ŝakunage*) multe floris pompege. De la fenestro de aŭtobuso al Kamaŝi mi vidis molan

visteriokoloron tie kaj ree en la montoj. Kaj ĉarmaj floroj de akvilegio (*odamaki*) allogis min en Denŝooen-ĝardeno de Toono, ruĝeta, purpura kaj blanka.

Post longa tempo pro la pandemio ni ĝuis vizaĝ-al-vizaĝan vojaĝon trinkante bongustan bieron ...

Pluvsezono

AKIYA Hideo

Nun estas junio. Jam pasis ĉirkaŭ duono de la jaro. Aŭdinte la venon de junio, oni iĝas ne trankvila pri kiam komenciĝos la pluvsezono, aŭ “tuyu” en la japana, en sia regiono. La pluvsezono de la japana sud-okcidenta insularo komenciĝas plej frue ekde la unua tagdeko de majo, kaj finiĝas en la tria tagdeko de junio. La pluva fronto trapasas la japanan ĉefinsulon de sud-okcidenta parto al nord-orienta parto.

En la 6-a de junio la Meteologia Agentejo anoncis la komencon de pluvsezono de la centra parto de Japanio kaj Kantō-regiono, kie mi loĝas. Laŭ la Agentejo, pluvaj tagoj daŭros pli ol unu monaton ĝis la 19-a de julio. Dum ĉi tiuj 40 kaj kelkaj tagoj ni devas pacience elteni veteron pli humidan, komence iom malvarman kaj fine en julio tre varman.

Dum la pluvsezono oni bezonas ĉiam porti sian pluvombrelon, eĉ se ne pluvas kiam li ekiras eksteren, ĉar eblas ekpluvi iam ajn. Sed, mi emas iri eksteren sen ombrelo, ĉar mi ne ŝatas porti aĵojn per mano. Eĉ kiam mi eliris kun ombrelo, mi kelkfoje lasis ĝin survoje, ekzemple en trajno. Do, ofte pro neatendita pluvo mi devis aĉeti portempan, malkaran ombrelon, ĝenerale platan.

Tiuj portempaĵoj restadas hejme kaj plenigas ombrelujon. Nun mi havas dek ombrelojn inkluzive tri faldeblajn. Estas tro! Tio embarasas min. Iam, eble antaŭ ĉirkaŭ dek jaroj, mi forĵetis kelkajn malnovajn ombrelojn. Kompreneble mi observis la regularon pri apartigo de forĵetaĵoj. Laŭ la regulo pri ombrelo oni devis disigi la pluvŝildotukon de la ombrel-ostaro. Ankaŭ tio tre ĝenis min. Mi decidis ke mi ne plu aĉetu novan ombrelon.

Alia problemo pri pluvo estas akvodamaĝo. En lastaj jaroj ofte okazis gravaj pluvegoj en diversaj partoj de Japanio. Ili kaŭzis multajn inundojn kaj terfalojn. Aparte impresa estas la tutlanda pluvego en aŭgusto 2021, kiu detruis entute ĉirkaŭ 6500 konstruaĵojn kaj mortigis 13 homojn, ĉefe en la okcidenta parto de Japanio.

Ankaŭ en julio tiujare, okazis granda terfalo en la

areo de Izusan, la urbo Atami, Ŝizuoka-gubernio. Post daŭra pluvo amaso da taluso sur montdeklivo disfalis, kiu forŝovis kaj terkovris 128 domojn, kiuj troviĝis sub la deklivo. En la damaĝo estis inkluzivitaj 26 mortintoj, unu perditu, kaj tri vunditoj.

Pluvego kaj sekva akvodamaĝo povas okazi ankaŭ ĉi-jare, ĉar lastatempe pluvokvanto tendencas plimultiĝi eble pro la tutmonda varmiĝo. Eĉ post la fino de la pluvsezono, en somero tajfunoj sinsekve atakos nin, kaj en septembro venos alia pluvsezono nomata “naga-ame.” Oni devas atendi aŭtunon por pli agrabla vetero.

Tamen, se mi devas diri, mi ŝatas la pluvsezonojn antaŭ kaj post somero. Ioma bruo de la pluvsono faras aliajn bruojn audiĝi relative malpli laŭta ol kutime. Kaj la konstanta ritmo de pluveroj povas trankviligi min.

Ankaŭ floroj en ĉi tiu sezono estas plaĉaj al miaj okuloj. Japanaj iridoj en diversaj koloroj; blankaj, bluaj, purpuraj, flavaj, aŭ rozkoloraj, floras belaj en marĉejo de mia ŝatata parko. De loko al loko laŭ mia kutima promenejo troviĝas hortensioj purpuraj, bluaj, rozkoloraj, aŭ blankaj. Tiuj floroj estas ne pompaj, ne tiom gajigaj. Sed ties kvieta aspekto tre plaĉas al la plejmulto de japanoj, mi pensas. Iridoj kaj hortensioj bele harmonias kun pluvo, ĉu ne?



iridoj